Heinrich Neye,

# Printemp-komenco

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Samlongas tag' kaj nokt' por ni
dufoje en la jaro,
elpensis oni tion ĉi
laŭ nia kalendaro.

Ja daŭris malhelec' ĝis nun
pli longe ol tag-helo,
pli longe brilas nun la sun'
por ni ĉe la ĉielo.

Revenis tiu ĉi al ni
kaj brilas pluan horon,
nun rekte nin alridas ĝi
kaj faras kromlaboron.

Printempa estas la veter',
mi fajfas pri alia,
pli varma estas la aer',
al mi ĝi plaĉas tia.

Treege ĝi ĝojigas min,
revenis primavero,
foriĝis vintro nun je l' fin',
kaj tio estas vero.[2]

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsanfang" de* Heinrich Neye *(∗1913-02-27 – †2002-07-18) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2007-04.*

*Mr-457-1 / Arg-417-826 (2007-05-30 14:53:06)*

*La origina germanalingva versio de tiu ĉi poemo aperis en 2007, en la n-ro 13/2007 de la germana agronomia revuo "Landwirtschaftliches Wochenblatt" (Postfach 4929, D-48028 Münster, Germanio, tel. +49-(0)251-51012-24 aŭ +49-(0)251-51012-35, ret-adreso: redaktion@wochenblatt.com, retejo: www.wochenblatt.com ). La eldonejo de la revuo kaj s-ino Erika Neye[Max-Zelde-Str. 2, D-22459 Hamburg, Tel. (040) 850 79 7], la vidvino de la aŭtoro, donis al mi en Aŭgusto 2005 la permeson de traduko kaj publikigo de la poemoj de Heinrich Neye.]*

[2] aŭ:
Treege ĝi ĝojigas min,
jam longe atendite,
foriĝis vintro je la fin',
ne estas mensogite.